

Opero en Esperanto en la praga Nacia Teatro

La 7-an de aprilo okazis en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago monda premiero de la opero *Sternenhoch* de la aŭtoro Ivan Acher, laŭ la romano de Ladislav Klíma (1878–1928) *Suferado de la princo Sternenhoch*. La opero estas kantata komplete en Esperanto. Plej interese estas, ke en la fono de tiu grava projekto staras neniu esperantisto – la ideo venis de Acher mem, kvankam li ne scipovas Esperanton, sed jes orientiĝas en ĝi pasive.

Li verkis la libreton ĉeĥe, petis tradukon al Esperanto de Miroslav Malovec (inter alie aŭtoro de la ĵus eldonita *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro*) kaj nur sekve, havante la Esperantan tekston je dispono, li komponis la muzikon.

La romano de Klíma estas morbida kaj ankaŭ la intrigo de la opero restas morbida: La princo Sternenhoch, stranga, ebriema kaj fiera, premita de siaj amikoj, ke li finfine edziĝu, elektas ene de iu sovaĝa festeno malbelan purigistinon Helga, filinon de pensiigita ĉefleŭtenanto kun putino, al kiu li sentas naŭzon, sed samtempe amon. Ŝi malamas lin, tamen naskas lian bebon; knabeton, pri kiu Sternenhoch fieras. Sed ŝi estas post la nasko furioza.

Mi lasu kanti Helgan: *Vi makulis min por ĉiam – ne per koito, sed per tio, ke vi devigis min porti dum naŭ monatoj en mi vian abomenaĵon, ke li identiĝis kun mi kaj mi kun li – mi freneziĝis! Li devas pereii!* Do ŝi mortigas la knabeton je la kapo de Sternenhoch kaj sekvas la vokon de sia koro – al sia amanto.

La fino estas same morbida: Sternenhoch metas Helgan en forgesejon, kie ŝi mortas, sed malgraŭ ĉio ĉi li sentas amon al ŝi kaj ofte sonĝe revas pri ŝi. Je la fino de la romano kaj ankaŭ en la fono de la opero li freneze haluciniĝante venas al ŝia kadavro kaj tie kun ŝi amoras.

Dum la tuta spektaklo intermiksiĝas la sonĝoj de Sternenhoch kun la realeco. Dume sonas perfektaj arioj, kantitaj de pintaj operkantistoj, kaj dancado en altkvalitaj ĥoreografio kaj plenumo.

Malgraŭ mia timo, kaŭzita de la kono de la libreto (miaguste malplaĉa), mi devas konfesi, ke de la tuto mi havis tre pozitivan impreson. Mi eble proksimigu ankaŭ la voĉojn de la ĉefaj rolantoj. Helga – soprano; patro de Helga – baso; Kuhmist, orakolino kaj sorĉistino – mezosoprano; poeto kaj amanto de Helga – baritono; rakontanto – basbaritono. Ĉiujn ĉi rolojn la aŭtoro komponis jam pensante pri konkretaj kantistoj, kun kiuj li jam antaŭe sukcese kunlaboris. Tamen problemon



Foto: Hana Smejkalová

li havis kun la trovo de la ĉefrolulo Sternenhoch. Li imagis precizan tenoron kun bela kontratenoro; provis kelkajn kantistojn, ĉeĥajn, italajn kaj polajn, kaj finfine hazarde li aŭdis en nordbohemia operejo en la urbo Ústí nad Labem precize tiun voĉon, kiun li serĉis. Ĝi apartenis al la bulgara kantisto Sergej Kostov, kiu nur tre mallonge estis en Ĉeĥio. Li komence timis eniri la Nacian Teatron, ĉar ne parolante la ĉeĥan, nek la anglan, li timis komunikajn problemojn, sed feliĉe li akceptis la rolon kaj havis nekredoblan aplaŭdon (kion eblas tamen diri pri la tuto). Mi supozas, ke per tiu perfekta plenumo li startigas sukcesplenan karieron.

En la programkajero troviĝas kompleta libreto en Esperanto kun la traduko en la ĉeĥan (ekzistas ankaŭ programkajero en la angla, do tie en la anglan). Al la premiero estis invitita ankaŭ M. Malovec kaj ene de la mallonga solenado post la spektaklo en la vestiblo Ivan Acher prezentis lin kiel tradukinton en Esperanton.

Antaŭ ol mi iris viziti la operon, mi kontaktis la aŭtoron kaj petis lin pri intervjuo, kion li volonte akceptis. Al mia demando, kial li elektis ĝuste Esperanton, li respondis, ke li deziris, ke oni ne strebu per la oreloj kompreni la vortojn, kio dum arioj ofte apenaŭ eblas, kaj povante legi supre la vortojn oni povu fokusiĝi al la percepto de la melodio. Kaj Esperanto pro siaj klaraj vokaloj en ĉiu silabo, kaj akcento sur la antaŭlasta, ŝajnas al li kvazaŭ lingvo kreita por muziko – kaj do li uzis ĝin tiel. Krome ĝi sone similas al la itala, la plej kutima lingvo rilate operojn.

La opero estis prezentita jam kvarfoje kaj kiel mi ĵus kontrolis ĉe la reta mendilo, plia prezentado en junio (kaj la lasta antaŭ la teatra somera libertempo) estas ankaŭ jam preskaŭ disvendita. Bedaŭrinde post la ferio ĝi longe ne estas enplanita kaj denove ĝi ekaperos en la scenejo nur fine de la jaro.

Petro Chrdle